# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

SCS - ED. GOIÁS - S/603
TEL.: 225-4761

CAIXA POSTAL 04-0406
70000 - BRASÍLIA/DF - BRAZILO


Jaqueline da Silva Tergolina
Rua Pedro de Carvalho, 161
cobertura nº 2 - Méier
20721 - Rio de Janeiro - RJ

N O V E M B R O 1 9 8 0

## ESPERANTISTA MANIFESTACIO EN TAGUATINGA

Taguatinga Esperanto-Rondo, aranĝis la 18an de Oktobro pasinta, manifestacion okaze de la elekto de la nova estraro kaj lanĉo de la kampanjo "Taguatinga: urbo esperantista".

En la sidejo de "Centra Socia kaj Distra Bernardo Sayão" en Norda Taguatinga kunvenis 25 personoj kaj diversaj aŭtoritatuloj inter kiuj urbestro S-ro Benedito, reprezentanto de laborista centro.

La programo de la manifestacio enhavis prelegon en portugala lingvo de Prof-ro Nelson Pereira de Souza pri la temo "Por que o Esperanto"?

En la arta parto partoprenis S-ino Ester kaj gefiloj per prezentado de muziko kaj poezio.

## DUA TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO

A.A. 54800 - BOGOTO - KOLOMBIO

Sub la devizo "FRATECO - PACO - LINGVISTIKA UNUECO", niaj geamikoj en Kolombio jam eldonis la emblemon de la 2-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. La dato ne estas ankoraŭ fiksita, sed antaŭvideble la manifestacio okazos en Julio 1982 antaŭ la Universala Kongreso en Antverpeno. En Bogoto, urbo sidejo de la Kongreso, organiza komitato sub la respondeco de Samideano Santiago Alvarez G. jam starigis la unuajn kontaktojn enlandajn kaj internaciajn por digne prepari la eventon.

## GRAVA ATINGO EN ĈINIO: RADIO PEKINO EN ESPERANTO ĈIUTAGE !

Ek de la unua de Novembro ĉijare, Radio Pekino elradias specialan elsendon en Esperanto direktitan al suda Ameriko. La programo estas aŭdebla ĉiutage de la 19,30 ĝis la 20,00 h sur la ondlongeco de 32m (9365 kHz) kaj 25,70m (11650 kHz).

La elsendo pritraktas kulturajn kaj turismajn aspektojn de Ĉinio kaj donas informojn pri la Esperanto-movado. Ekzemple, la 6an de Novembro, oni aparte atentigis la geaŭskultantojn pri la 66a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Brasília kaj kiu jam ricevis la altan protektantecon de Prezidento Figueiredo. La parolisto komentariis la informon per la konata proverbo "Komenco bona, sukceso duona". Tamen li forgesis aldoni, ke la alia duono de la sukceso dependas de la membroj de nia Asocio, ĉiuj sopirantaj arde kunlabori en la preparo de la kongreso !

La atingo ĉe Radio Pekino estas tre grava por nia movado, depost, ke ĉina Esperanto-Ligo aliĝis al UEA en Stokholmo. Estas nia devo subteni la laboron de la ĉinaj esperantistoj skribante kaj komentante la elsendon. La adreso estas:

## LA RADIO-AMATOROJ KONKURSIS

ILERA (Internacia Ligo Esperantistaj Radio-Amatoroj) lanĉis ĉiujaran konkurson por radio-amatoraj kontaktoj en Esperanto. La Ligo nombras nuntempe 191 membrojn en 33 landoj. Brazilo okupas la duan lokon kun 26 membroj, post Japanujo, kiu havas 32 radio-amatorojn esperantistajn.

Ĉiujare la konkurso disvolviĝis dum la dua semajnfino de Novembro, ek de la 12a horo (Universala Tempo) de sabato, ĝis la 22a h de dimanĉo. Premiitaj estas la partoprenantoj, kiuj atingas plej grandan nombron da poentoj per kontaktoj en la propra kontinento kaj ekster-kontinentaj.

Ĉijare, inter aliaj, partoprenis en la konkurso la jenaj brazilaj radio-amatoroj: PT2 CA (Enivaldo, Brasília, Landa Reprezentanto de ILERA por Brazilo), PT7 RV (Rogério, Fortaleza), PY7PY (Apolônio, Recife) kaj PP2 LE (Vellozo, Bona Espero). Ĉi-lasta stacio havas unikan karakterizon: ĝi estas alimentita per baterio kaj situas en regiono, kie ekzistas neniu energi-fonto kiu ĝenas aŭ kiunoni povas ĝeni !

Radio-amatorismo, kunligita kun Esperanto, donas praktike la maksimuman senperan liberecon en la kampo de tutmonda komunikado.

ILERA povas ludi tre gravan rolon por la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj por la popularigo de radio-amatorismo inter esperantistoj.

o o o o



## SIMO MILOJEVIĈ DUAFOJE EN BRASÎLIA

Samideano Simo, redaktoro de revuo "Esperanto" kaj komisiito de UEA por nia Universala Kongreso, alvenis en Brasîlia la 12-an de Novembro.

Lia vizito celis difini diversajn punktojn de la Dua Bulteno de la Kongreso kaj kontakti plej diversajn instancojn. Per tio oni finis la redaktadon pri loĝado, ekskursoj, bankedo, kun la koncernaj prezoj.

Estas antaŭvidite jam en la komenco de la venonta jaro enpoŝtigi la Duan Bultenon, kiu cetere enhavos mendilojn kaj ĉiujn informojn.

## 66-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO: STATISTIKO ĜIS LA 16a DE OKTOBRO 80

Universala Esperanto-Asocio dissendis la unuan oficialan komunikon pri la kongreso kun pluraj utilaj informoj. Inter alie estis publikigita la statistiko de la aliĝoj, kiu estas rekorda por tiu frua dato kaj aŭguras rekorde grandan ekstereŭropan Universalan Kongreson.

Ĝis la 16a de Oktobro registriĝis 672 aliĝoj, el 43 landoj: Brazilo 245, Argentino 73, Francujo 34, Nederlando kaj Usono po 29, FR Germanujo 27, Svedujo 22, Britujo 19, Finnlando 17, Japanujo 16, Belgio, Bulgario kaj Venezuelo po 12, Hungario kaj Kanado po 11, Hispanio 10, Aŭstrio, Norvegujo kaj Pollando po 7, Danlando, Italio, Jugoslavio kaj Svislando po 6, Ĉilio 5, Irlando, Islando kaj Israelo po 4, Aŭstralio, Ĉeĥoslovakio, Kolombio, Luksemburgio kaj Portugalio po 3, Ĉinio, Germana DR, Meksikio, Nov-Zelando kaj Urugvajo po 2, kaj po 1 el Greklando, Indonezio, Korea Respubliko, Liberio, Sud-Afriko kaj Zairio.

## V I V O   D E   N I A   A S O C I O

La 29an de Novembro, samideano Silvestre Bego, el Sorokaba, dum tre agrabla rekontiĝo en nia Asocio, intervjuis la ĉeestantojn (Enivaldo, Lûcia, Josias, Francisco, Neima) kaj sonbendigis la paroladon.

La intervjuo (daŭris tridek minutojn) celis mesaĝon al Sorokaba Radio Klubo kadre de la programo "Sintezo de Esperanto - Internacia Lingvo", ĉiusabate elsendita al ne kaj esperantistaro.

Ni parolis precipe pri la okazonta 66a UK, la ĝisnunaj konkretaj laboroj jam faritaj kaj insiste invitis la esperantistaron partopreni ĝin, speciale la komencantojn, klarigante al ili ke ne tiom gravas ilia esperantanivelo sed ilia frata partopreno kaj kunlaboro.

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -




Post granda klopodo de LKK kaj rekta kontakto de sia Prezidanto (Senatado José Lins) kun la Ministro de Komunikadoj, FINFINE la Brazila Filatelia Komisiono eldonos specialan poŝtmarkon kies motivo estas nia 66a UK !






## "VERDAJ BUTIKOJ" MALPERMESITAJ -

La prestiĝo de niaj kongresoj postulas striktan observon de pluraj reguloj. Unu el tiuj estas koncentrigi eventualan ven= dadon de libroj, memoraĵoj kaj diverspecaj esperantaĵoj en la ejojn al tio destinitaj, laŭ superrigardo de LKK. Privataj eldoni= stoj, kolportistoj, produktantoj de suveni= roj, bonvolu nepre kontakti LKK ( Caixa Postal 04-0406 - BRASÍLIA DF), por proponi kunlaboron en tiu kampo.

Ĉiaspeca komercado privata en la inter= no de la kongresejo estos malpermesita kaj, ekstere, ĝi estos kontraŭ la leĝoj, kiuj reguligas la komercon en la Federacia Distrikto.

## - KLIMATO EN BRASÍLIA -

Dum julio, en nia ĉefurbo, la klimato estas malvarmete seka ( tem= peraturo dumnokte ĝis 8-10 ºC ).

Se ĉi tiu informo estas agrabla por eŭropanoj, kiuj malprave timas la tropikan varmegon, povas tamen esti timiga por nordorientaj brazi= lanoj, kiuj ĉi tie trovos ........ nekutiman "froston" !

........PORTU LAN-KOVRILON !!

Ĉi-tiu alvoko validas por ĉiuj brazilaj kongresanoj, kiuj tranoktos en la Komuna Loĝejo. Ĉar LKK ne ha= vas la eblecon disponigi tiom da lit= tukoj kaj lankovriloj , ĉiuj loĝan= toj en la komuna loĝejo devos mem kunporti la necesajn ekipaĵojn.

TRE GRAVE!

## - AKURATECO BEZONATA -

Pro la amplekso kaj inter- plekteco de la kongresa progra= mo estos esence respekti la fiksitajn horarojn de la diversaj programeroj.

Interesitoj ĉeesti, ek de la komenco, la prelegojn kaj la teatrajn prezenta= dojn, sciu, ke, malantaŭ la kulisoj, la homoj estos senkompate akurataj kaj ke, kutime, oni fermas la enirpordojn por eviti ke, malfruintoj, ĝenu la programojn.

## - KOLOMBIO VOKAS -

Dum aparta programero de nia kongreso en Brasília, la kolom= biaj esperantistoj prezentos siajn planojn por la Dua Tut- Amerika Kongreso de Esperanto, kiu estas definitive fiksita en Bogoto de la 17a ĝis la 19a de julio 1982. En la kolombia ĉefurbo funkcias nuntempe kvar Esperanto-kursoj post la elsendo de du televidaj programoj en aprilo, kiuj vaste diskonigis la internacian lingvon.

## - LA PRIVILEGIO ESTI INFANO -

Alia firmo regalos la partoprenantojn de nia Infan-Kongreseto. Temas pri "GAROTO S|A", kiu jam sendis du kestojn de siaj ĉokoladaj produk= toj por allogi la aliĝon de niaj batalontoj!

## - KURSOJ EN BRASÍLIA -

La unuaj kursoj ĉe SENAC en nia urbo finiĝis en majo per diplomiĝo de 25 gelernantoj. Alia serio de intensivaj kursoj jam estas planita ek de la 26a de junio.

**NIA POŜTO** : En la modesta spaco de "Tagiĝo" ne eblas publikigi eseojn, longajn leterojn, polemikojn kaj edziĝ-petojn. Same, ne eblas flate kaj riproĉe listigi la homojn kiuj laboras kaj tiujn, kiuj nenion faras por la 66-a UK, ĉar ambaŭ listoj estus tro longaj. Tial, kun bedaŭro, nia redakcio devas aŭtoritate limigi la menciojn al la esencaj punktoj:

-Elheus L. de Sà (Ilheus), estas favora kaj al la formikoj kaj al la cikadoj. (Tagiĝo apr.81). Li aliĝis la kongreson por labori, sed dume li ŝatos aŭdi kantojn

- A.Flores (Volta Redonda), informas, ke "Companhia Siderúrgica Nacional" reel= donos 5.000 ekzemplerojn de sia teknika prospekto en Esperanto kaj disdonos ilin dum la 66a UK.

- F.A.Mata (Maceió), estas fervore trejnanta ĥoron "Pastoril" de la Universitato de Alagoas, kiu prezentos programon en Esperanto dum nia kongreso.

- ANONIMUL(IN)O (Rio), laŭte protestis, ĉar oni akuzis lin/ŝin esti sendinta la faman telegramon menciitan en nia klaĉangulo de marto 81. Por defendi la reputa= cion de nia amiko, la redakcio deklaras, ke, aŭtoro de tiu telegramo, estas ŝer= cemulo loĝanta en Brasília !

- PY3ACE (RS) , perradiis al LKK gratulante pro kelkaj ideoj en la programo de nia kongreso, kiujn ankaŭ li havis.

Tre bone ! Se hazarde tiuj ideoj montriĝos ne taŭgaj, ni ĉiam povos aserti ke LI unue elpensis ilin !!